# GISTO-DEC-2003

GOVaske = otto@caiweb.com.br
Str. Esperanto, 880

Senpaga legajxo – ttt-skribo.

## PROKRASTIGA FENOMENO

Chiu atenta samideano jam rimarkis, ke iu mistero bremsas la progreson de diligentaj komencantoj. Ili rapide lernas gxis la nivelo kiam ili sukcesas babili inter kompanoj sed neglektas erojn kiuj restas preskau nerimarkitaj inter samnivelaj geamikoj kaj, pro edukiteco neniu korektas la parolemajn komencantojn. Ili mem ne rimarkas sed samideanoj el nivelo iomete pli alta kuragxas averti. Sur la vojo de ni chiuj staras barajxo tra kiu oni devas impeti, por postlasi la neglekton. En mia vivo tio okazis antau multaj jaroj. Finlerninte la bazan E-kurson,(FGV,Rio), mi sentis min ankorau tima alparoli geamikojn pro la fakto ke mi ne sciis diri multe pli ol balbuti kelkajn salutvortojn. Jxusa emeritulo, mi pensis kandidatigxi al volontula servo en UEA. Iun tagon mi verkis plejzorgan leteron al iu stabano de la Centra Oficejo.proponante min kiel helpanton, kun la celo perfektigi mian Esperanton meze de la tie dejxorantaj oficistoj. Respondo prokrastigxis sed alvenis koverto sen tembro, kun postsxtampo el Roterdamo. Malferminte la koverton mi eklegis klaran manskribon. Li/sxi (neniu subskribis) unue laudis mian intencon volontuli en UEA. Poste li komencis tani mian felon kaj tordi miajn du orelojn per la montro de multaj eraroj miaj. Chefe mankis au trois akuzativoj...enestis misuzitaj vortoj inter tiom da malglatajxoj ke mi falis el la nuboj. Aldone la ulo diris ke je tiu nivelo mi estus ne kapabla plenumi laborojn tie kaj ne kapablus lerte skermi kontrau la kolegaro. Mi ege hontis pro mia pretendo konsideri min bona esperantisto. Tiu evento skuis min sufiche por ke mi devokonscie ree ekstudis. Vere, mankis malmulto, por ne resti motivo de honto. – Karaj, chi rakonton pri vera okazintajxo mi prezentas kun la celo veki chiujn daurajn komencantojn. Oni ne forgesu ke Porto Alegre proponis sin por gastigi vizitantojn de la BKE/2005. Chu la gauchoj ache alparolos kongresanojn? Certe ne, sed ne senpage, tiu estas, diligente prepari sin, precipe "orumi" nian vizitkarton = flue paroli (ne krpkodili!). Nenie E-movado prosperas nur per fanfarona eldiro MI AMAS ESPERANTON au, turisme partopreni E-Kongresojn. Antau ol fini mian recepton, permesu al mi aldoni: oni devas nepre kaj atente legi chion...peti helpon de vortaro kaj de geamikoj...flankensxovi sian pigron!

## RADIO

En 1992 Andy Künzli avertadis ke, se Svisa Radio ne ricevos multajn mesagxojn de gesamideanoj, gxi baldau sinkos. Vere, baldau poste gxi finis E-programaron. Nun estas forta motivo alskribi CHRI. Antau nelonge gxi duobligis la elsendotempon al tuta unu horo dum la pluraj horaroj. Jen motivo, por komplimenti ties estraron per almenau posxtkarton. Kostas nur R$ 0,50 char oni povas sendi gxin al la brazila adreso: CHRI – Str, José Linhares, nº.137/401 – 22430-220 – RIO. – Ne forgesu tion antau ol ankau CHRI finos E-elsendojn!

## El JUNA AMIKO:

Chu malfermi la busxon? – Por paroli, jes sed ne chiam por diri ion. Ekzemple, chel'dentisto, kiam oni sidas sur la komforta tortursegxo. Komence li diras al vi "Malfermu la busxon". Tiam li ensxovas kotonon. Kiam gxi estas plena li naive demandas: kiu dento suferigas vin? Al tio vi povas respondi nur per onomatopeaj gargarsonoj. Símile agas hartondistoj. Kiam oni sidas sub blanka tolajxo, kvazau oficanta pastro, la dejxoranta artisto gxentile deprenas la okulvitrojn pretekstante ke ili gxenas liajn manovrojn kaj tuj poste li enmanigas amason da gazetoj kiujn, kompreneble, oni ne povas legi pro manko de okulvitroj. Mi ne legas, li pensas ke mi preferas konversacii kaj komencas: "Vi ne plu havas multajn harojn, sinjoro!" Vana dirajxo char mi ne bezonas specialiston por tion scii. Jen la katastrofo de la mondo ke oni ju pli parolas des malpli estas dirinda.

## RUZAJXO

Kamparano necesbezona decidis vendi mulon. Najbaro achetis gxin, pagis kaj konsentis ricevi la mulon en la sekva tago. Okazis tamen ke la besto mortis dum la nokto. La najbaro potulis redonon de sia mono tuj post kiam li sciigxis pri la morto de la animalo. Estigxis jena konversacio:

- Mi ne povas redoni al vi la monon. Mi elspezis la tuton – diris la vendinto. – Reportu al mia bieno la mortan mulon.
- Kion vi faros?
- Mi lotos gxin.
- Sed, kiu achetos lotbileton por morta besto?
- Ne zorgu. Alportu la kadavron. – Alportinte la mortan mulon, li hejmen reiris. Post semajno li demandis sian najbaron
- Kiel finigxis la afero pri la mulo?
- Mi lotis gxin inter 500 homoj po R$ 2,00. Restis 998 Realoj da profito.
- Sed, chu neniu protestis?
- Nur la gajninto.
- Kaj, kion vi faris?
- Al li mi redonis du Realojn...

## PENTRAJXO

En RIO okazis ekspozicio de modernaj bildoj. Vizitanto atente alrigardis unu el la bildoj. Poste li demandas la cheestantan pentriston:

- Kion prezentas tiu chi bildo?
- Bovinon sur pasxtejo.
- Ho, jes, sed pasxtejon mi ne vidas.
- Tiun la bovinoj jam formangxis.

La vizitanto denove longe alrigardas la bildon kaj post momento denove demandas

- Sed, majstro, tie ech bovinojn mi ne vidas.
- Mi petas vin konsideri, diras la pentristo, kial restu tie bovinoj, se jam ne plu restas herbo?

## BKE/2005

GEA lastatempe tute silentas pri preparlaboroj por la Kongreso en Porto Alegre. Al multaj vizitantoj en la e-Reto plachus legi informojn far GEA kaj la LKK. La animo de negoco estas la sekretado sed silento forgesigas pri la grava evento kaj la anaro neglektas tro longe. Subite alvenis la difinita dato kaj la gaucharo ne havos indajn prezentajxojn per kiuj akcepti la Kongresanojn venintajn eble ech de eksterlandoj.